



Norvega Esperantisto

E S P E R A N T O B L A D E T

N-ro 8 1967

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

Ĉefredaktoro: Johan Hammond Rosbach

3-a periodo
33-a (38-a) jaro
Monata

Impresoj el la 52-a Universala Kongreso de Esperanto

TEL-AVIV-KONGRESO EN ROTERDAMO

La 52-a Universala Kongreso laŭ nombro de partoprenintoj ne apartenas al la impone grandaj Esperantaj kongresoj. Tio havas diversajn kaŭzojn: Interalie la aliĝado al la kongreso en Tel Aviv estis hezitema, parte pro necerteco pri la kostoj de vojaĝo kaj restado, parte pro duboj pri la evoluo de la situacio en la Meza Oriento. Kiam en Junio venis la sciigo pri translokigo al Roterdamo, tio starigis al multaj jam aliĝintoj novajn problemojn rilate al vojaĝpermesoj kaj pasportaj vizoj. Ĉar Roterdamo por la plimulto de la esperantistaro estas pli facile atingebla ol Tel Aviv oni povus atendi multajn novajn aliĝojn post la translokigo, kaj fakte okazis ioma kresko en la nombro de aliĝintoj, sed por la plimulto evidente estis tro malfrue ŝanĝi somerferiajn planojn. Entute aliĝis 1253, el kiuj ne venis al la kongreso proksimume 500, ĉefe el Israelo kaj el orienteŭropaj landoj. La nombro de ĉeestantaj kongresanoj do estis sufiĉe modesta.

Pro la relative malalta nombro da ĉeestantoj la kongreso havis iom alian aspekton kaj karakteron ol la lastjara en Budapeŝto. En la 52-a oni facile trovis sian vojon al la loĝeja ĝiĉeto, oni facile trovis sian kongresamikon en la kongresejo, oni ne bezonis stari longe en atendovico por ion aranĝi.

Laŭ decido de UEA la nunjara kongreso portis kaj portos la nomon Tel Aviv —

Roterdamo, kaj dum la kongreso mem oni aŭdis tiel ofte Tel Aviv kiel Roterdamo.

La somera numero de Norvega Esperantisto esprimis admiron al UEA pro la kuraĝo aranĝi Universalan Kongreson en Roterdamo nur kelkajn semajnojn antaŭ la okazo de la renkontiĝo. Nun oni povas pro brile plenumita laboro admiri kaj gratuli la Centran Oficejon, ĝian direktorinon Marianne Verm-aas, la konstantan kongresan sekretarion Pompilio kaj grandan nombron da Nederlandaj esperantistaj helpantoj.

KONGRESEJO KAJ ĈIRKAŬAĴOJ

La kongresejo «de Doelen», koncerteja konstruaĵo inaŭgurita en 1966, havas konsiderindan nombron da belaj salonoj pli malpli grandaj, tiel ke ĉiuj konvenoj de la kongreso povis okazi en la kongresejo mem. Ekster la salonoj troviĝas en la teretaĝo vasta vestiblo, kiu donis abundan lokon al ĝiĉetoj por informado, kasoj, librovendado, ekskursoj, TEJO, venontjara kongreso ktp. Bedaŭrinde mankis kongresa poŝtofiĉejo. Sur la unua etaĝo estis vastaj galerioj kun agrablaj sidlokoj kaj tuttage funkcia bufedo kun vendado de refreŝigaĵoj.

La koncertejoj, «plej granda kaj plej moderna de Eŭropo» laŭ teksto sur poŝtkarto, situas ĝuste antaŭ la ĉefa stadiono. Aliaj najbaroj estas la fama promen- kaj butikstrato Lijnbaan, diversaj troturaj restoracioj kaj la

Urbodomo, — ĉio en konvena proksimeco por promenadoj, butikumadoj kaj liberaeraj kaffrinkadoj inter kongresaj aranĝoj.

KUNVENOJ

La Solena Malfermo enhavis la tradician vicon de salutparoladoj: de reprezentantoj de kongresa lando kaj urbo, de estraro, de lokaj aranĝantoj, de reprezentantoj de registaroj kaj de landaj Esperanto-organizoj, kaj finiĝis per la festparolado de la prezidanto de UEA. Por la Norvega registaro salutis Ludvig Anjer, por NEL Olav Thormodsen. Sciante ke tio tre interesos multajn Norvegajn esperantistojn, mi ankaŭ mencias ke por Hinda Esperanto-Instituto salutis s-ino M. Haudebine. La festparolado donis valoran superrigardon pri la ĉefaj pritraktotaj dum la kongreso kaj pri la proksimaj taskoj de la Esperanto-movado. Mi rekomendas al ĉiuj, atente studi la paroladon kiam ĝi aperos en nia internacia revuo Esperanto — kaj espreble ankaŭ en Norvega Esperantisto. Inter diversaj partoj de la kunveno ni aŭdis muzikon; sed la kunveno ne finiĝis per komuna kantado de nia Himno, kiel ĝis nun estis kutime.

Malgraŭ relative malgranda nombro da kongresanoj, la unuopaj laborkunvenoj ĝenerale havis tute kontentigan partoprenon. Gravajn flankojn de nia laboro pritraktis tri laborsekcioj:

1. «Esperanto en fakoj kaj profesioj»,
2. «Lerneja kaj eksterlerneja instruado de la internacia lingvo»,
3. «Esperanto por turismo».

La diskutojn de 1-a kaj 3-a sekcioj enkondukis Maurice Jaumotte, estrarano de UEA kaj ĝenerala prezidanto de Belga Esperanto-Federacio; en la 2-a sekcio enkondukis Günther Becker, ĝenerala sekretario de UEA. En ĉiuj tri sekcioj estis vigla diskutado kun multaj interesaj argumentoj kaj valoraj ideoj.

Günther Becker ankaŭ gvidis kunvenon de Informaj Fakoj, en kiu oni ankaŭ aŭdis novajn interesajn ideojn, precipe pri la gazetara laboro.

Maurice Jaumotte enkondukis la diskutojn en la fakkunvenoj de

Internacia Turisma Esperanto-Asocio kaj

Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista kiujn li mem gvidis. Mi mencias tiujn du fakkunvenojn aparte pro tio ke ili rilatas al unu el la ĉeftemoj de la kongreso de la

Jaro de Turismo. Mi ankaŭ kaptas la okazon aparte menciigi Maurice Jaumotte, kiu en ĉi tiu kongreso multe impresis la kongresanojn per sia vigla partepreno, per sia dinamika personeco, kaj per sia ĉion venkanta humoro.

Cetere okazis dum la kongreso multaj fakkunvenoj kun valoraj diskutoj kiujn oni ŝatus raportiti. Ĉiujn kunvenojn neniu povus ĉeesti, ĉar ili ofte okazis samtempe kun io alia. Laŭ la kongresa gazetara servo, kiun kiel kutime tre efike gvidis Marinko Ĝivoje, okazis kunvenoj de Mondpaca Esperantista Movado, Kristana Esperantista Ligo Internacia, Martinus Instituto, IOE, Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, Internacia Esperantista Asocio de Juristoj, Universala Medicina Esperanto-Asocio, Internacio de Militrezistantoj, Internacia Geografa Asocio, Oomoto, Kvakera Esperantista Societo, Internacia Fervoja Esperanto-Federacio, Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Pluraj aliaj fakkunvenoj estis anoncigitaj en la kongreslibro; eble ili ankaŭ okazis, sed sen raporto al la gazetara servo.

Ĝenerala kunveno de UEA interalie diskutis ĉu la kongresa solena malfermo finiĝu per komuna kantado de la Himno. Tio ne okazis en Roterdamo pro la Principaro de Frostavallen kiu rekomendas ne kanti la Himnon en ĉeesto de multaj eksternuloj. La plimulto sin esprimis por kantado de la Himno dum la solena malfermo. La kunveno ankaŭ diskutis kiel oni povus utiligi la okazon doni informojn al neesperantista publiko dum Universala Kongreso, ekzemple per aparta informejo, per ekspozicio aŭ per informkunveno.

La Komitato de UEA havis plurajn longajn kunsidojn, kiujn ĉeestis sufiĉe multnombra publiko, kaj pritraktis tre ampleksan tagordon, al kiu apartenis elekto de nova Estraro de UEA, kiu nun konsistas el: *Ivo Lapenna*, prezidanto, *Erik Carlén*, vicprezidanto, *E. L. M. Wensing*, vicprezidanto, *Günther Becker*, ĝenerala sekretario, *H. R. Tonkin*, *Ulrich Lins*, reprezentanto de TEJO, *E. J. Woessink*, financoj, *Maurice Jaumotte*, fakaj kaj landaj asocioj, *Josef Toczyński*, lernejoj kaj *Peter Zlatnar*, kongresoj.

NE NUR LABORO

Ĉiuj kongresanoj estis en oficiala akcepto en la urbodomo.

Internacia Somera Universitato havis sian

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de la redakcio: Hulderveien
17 B, Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20-a en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,00

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,00
1/2 p. kr. 75,00, 1/4 p. kr. 38,00,
1/8 p. kr. 19,00.

På norsk

De tempo al tempo Norvega Esperantisto parte aŭ plene represas la enhavon de la informaj bultenoj kiujn la Informa Fako de nia ligo sendas al ĉiuj Norvegaj gazetoj. Ni faras tion por ke la membroj estu informitaj pri tiu agado. Pro tio ke la koncerna bulteno aperis jam minimume unu monaton pli frue ol la numero de Norvega Esperantisto en kiu la enhavo estas redonita, la novaĵoj ne povas esti novaj al tiuj esperantistoj kiuj regule kaj atente legas la internacian Esperanto-gazetaron. La gazetara bulteno aperas en ambaŭ oficialaj lingvoj Norvegaj; ni redonas ĉiun tekston nur en unu el ili, supozante ke ĉiu samlandano povas kompreni ambaŭ lingvojn.

La Tria Ordono diras

Sanktigu la tagon sanktan.

La du libroj de Hans Amund Rosbach celas helpi vin al tio.

CENT HIMNOJ,
ke vi povu kanti laŭdon al Dio.
PREPAROJ AL DISERVO,
ke vi ĉiutage preparu vin al
la sankttago.

Mendu ĉe Esperantoforlaget aŭ ĉe
la eldoninto,

H. A. Rosbach, Nergt. 37 c,
Kristiansund N.

SCIIGOJ DE N.E.L.

Kotizoj por 1968. Por eviti interrompon en la liverado de Norvega Esperantisto estas grave ke ĉiuj membroj pagas siajn kotizojn frue. Klubanoj bonvolu pagi al la kluba kasisto, rektaj membroj rekte al N.E.L., prefere jam antaŭ Kristnasko.

Anoncoj en Norvega Esperantisto. La kotizenspezoj ne sufiĉas por eldoni dek plenajn 16-paĝajn numerojn de Norvega Esperantisto en la jaro. Sed kelkaj anoncoj estus bona helpo. Ni tial petas la membrojn varbi anoncojn por nia gazeto. Vidu la anoncprezojn sur ĉi tiu paĝo.

U.E.A.-kotizoj 1968. Por eviti interrompon en la ricevado de la Jarlibro kaj de la gazeto «Esperanto» ĉiuj Individuaj Membroj de U.E.A. devas nun laŭeble baldaŭ pagi sian kotizon por 1968. Pagu al la loka Delegito aŭ rekte al la Ĉefdelegito por Norvegujo, s-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo 6, — poŝtĝirokonto 133.29. Ni rekomendas al ĉiuj membroj aboni la Jarlibron kaj la gazeton de U.E.A. La kotizoj por 1968 estas: Membro-Jarlibro kr. 25,00, Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton «Esperanto») kr. 50,00, Membro-Subtenanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton) kr. 75,00.

53a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Madrid, Hispanujo, 3.—10. Aŭgusto 1968. Aligiĵoj estas riceveblaj de Turisma Servo de N.E.L., Boks 942, Oslo 1. Pri planoj de komuna vojaĝo ni poste informos.

La Oficeja fondaĵo. La Liga Estraro kore dankas al ĉiuj bonkoraj, malavaraĵ donacintoj por tiu grava fondaĵo. Sed ni daŭre bezonas pliajn donacojn por teni la oficejon. Ĉiuj donacoj estas bonvenaj, ĉu ili estas grandaj, ĉu malgrandaj.

Taskotabelo por la kluboj. — *Novembro.* La estraro sendas registritan informon al ĉiuj membroj, kiuj ne eksciis laŭ la statuto, sed de kiuj tamen revenis la poŝta enkasigilo sen pago,

ke oni nun forstrekos ilin kiel klubanojn. La estraro admonas la klubanojn pagi la kotizojn por la venonta jaro. La Delegito de U.E.A. kolektas la U.E.A.-kotizojn por la venonta jaro kaj varbas novajn Individuajn Membrojn de U.E.A. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

Raporto de la Liga Estraro pri la 3a jarkvarono. Okazis 1 estrarkunveno. Oni elsendis 2 cirkulerojn al la kluboj kaj 1 al la rektaj membroj. Olav Thormodsen reprezentis N.E.L.n ĉe la U.K. en Rotterdam, la norvegan registaron reprezentis Ludvig Anjer, kiu ankaŭ partoprenis la Komitatkunsidojn de U.E.A. dum la kongreso. Kjell Gustavsen fariĝis nova ekspedanto de Norvega Esperantisto. Oni decidis klopodi pri nova eldono de «Faktoj pri Norvegujo» kaj pri restarigo de migranta ekspozicio. Oni petos al «Kulturrådet» pri subvencioj.

La Liga Estraro.

Impresoj el la 52-a - -

20-an sesion kun prelegoj de Paul Neergaard, Ivo Lapenna, Juan Régulo Pérez, Oton Pancer, André Albault, J. C. Wells kaj C. Conterno.

Internacia Arta Teatro, kiu havas en 1967 sian 10-jaran jubileon, prezentis plurajn teatraĵetojn, parte en du oficialaj prezentadoj, parte en libervola prezentado kun enirpago. La kongresanoj montris kontenton per aplaŭdadoj kaj per multnombra vizito al la libervola prezentado.

En la tago de tuttagaj ekskursoj oni povis elekti inter ŝipekskurso tra granda regiono kun vizito al Loevestein kaj aŭtobusa ekskurso al Middelburg. La partoprenintoj de ambaŭ aranĝoj estis tre kontentaj: al tiu kontribuis ankaŭ tuttaga belega vetero.

En la Belerta Konkurso Nederlanda junulo Wouter F. Pilger gajnis ne nur la 1-an premion en Originala Poezio por sia poemo «Mia ĉio», sed ankaŭ la 1-an kaj 2-an premiojn en Tradukita Poezio. Neniu ricevis la distingon «Aŭtoro de la jaro», sed Nederlanda junulo E. N. Mulders el Nederlandaj Antiloj estas proklamita «Nova talento».

En la Oratora Konkurso 4 gejunuloj el 4 landoj prezentis siajn paroladojn al aŭskul-

tantaro de pli ol 300 kongresanoj. La unuan premion gajnis Franca junulo Francisko Simonnet kaj la duan Eliza Kehlet (Weide).

Dum la kongreso okazis du oficialaj baloj, unu de la 52-a kaj alia de la 23-a Internacia Junulara Kongreso, kiu okazis en Rotterdam samtempe kun la Universala Kongreso. La junulara balo ne estis limigita al la gejunuloj, sed ankaŭ aliaj povis partopreni. La junulara balo okazis en la ŝipo Jan Backx, kie la junulara kongreso loĝis, manĝis kaj kunvenis. Tiu ŝipo kaj la ŝipo «Seven Seas» kuŝis ĉe la kajo Parkhaven apud Euromast (kaj proksime de la Norvega preĝejo), kaj en ambaŭ ŝipoj loĝis multaj kongresanoj komforte je eksterordinare moderaj prezoj dum la kongresa semajno.

En unu el la vesperoj okazis «Varia vespero». Oni klarigis al ni ke pro la ekonomio de la kongreso oni ne povis aranĝi la vesperon kun ne-esperantistaj profesiaj fortoj, kaj la ĉeestantoj devas kontentiĝi je la prezentadoj de esperantistoj. Verŝajne neniu ĉeestinto dezirus ne-esperantistan prezentadon anstataŭ tiu kiun ni ĉeestis. Ĝi okazis sub gvido de Marianne Vermaas, kiu mem multe kontribuis al la sukceso de la vespero per sia gaja kaj trafa anoncado de la agantoj. Ramona van Dalsem*) entuziasmigis la ĉeestantojn kantante aron da kantoj laŭ propraj melodioj. La muzikan akompanion prizorgis ŝia samlandanino Toos Schoonman, kiu mem ludis al ni verkojn de Schubert kaj Chopin. La Haga Teatra Klubo, en kiu ankaŭ Ramona van Dalsem kaj Toos Schoonman estas gravaj rolulinoj, nin gajigis per du skeĉoj. Dum la vespero oni havis la okazon konatiĝi kun la deklama arto de la esperantista Rusa aktoro Nikolai Rytikov, kiu nun loĝas en Londono kaj estas aktiva en la Brita Esperanto-movado.

Supre mi mallonge menciis nur iom el tio kion oni travivis dum la 52-a. Anstataŭ ol daŭrigi mi preferas rekomendi al vi ĉiuj legi la detalajn raportojn pri la kongreso kiuj certe aperos en la unuaj aŭtunaj numeroj de la revuo «Esperanto» kaj «Heroldo de Esperanto», kaj aldonas iom pri la ĝenerala impresado de la kongreso. Laŭ mia scio ĉiuj kunsidoj, kunvenoj, aranĝoj bone sukcesis. La kongresanoj verŝajne pli ĉeestis la kunvenojn ol kutime. Se mi ĝuste kaptis la situacion, ĉio okazis eksterordinare trankvile kaj harmonie.

*) Vidu recenzon p. 106. (Rim. de red.)

Por Norvega ĉeestanto unu afero estis malĝojiga: Norvegoj preskaŭ mankis en la kongreso. El pluraj vidpunktoj estas bedaŭrinde ke Norvegoj en la lastaj jaroj nur tre malmultnombre ĉeestis la universalajn kongresojn: La unuopa esperantisto tiel perdas unu el la grandaj travivaĵoj kiujn oni povas havi per la internacia lingvo. Eksterlandaj kongresanoj kiuj deziras kontakton kun nia nacio, vane serĉas tian kontakton en la kongreso. Al la movado en nia lando iom post iom mankos tiu instigo kaj kuraĝigo kiun oni ricevas per la internaciaj kontaktoj.

Ĉu ni povos ŝanĝi tion? Venontan jaron la Universala Kongreso estos en Madrid. En la lastaj jaroj Hispanio fariĝis feriolando de multaj Norvegoj. Kial ne Madrid venontjare? Havigu al vi jam nun la unuan bulleton de la kongreso, aliĝu, studu broŝurojn, mapojn kaj estu preta aliĝi al komuna kongresvojaĝo kiam tiu aranĝo estos preta por akcepti aliĝojn. Per tio vi preparos grandajn travivaĵojn por vi mem kaj utilon por la Esperanto-movado en nia lando.

LA

Faktoj pri Svedujo

Esperanto enpenetras pli kaj pli oficialajn instancojn diversloke en la mondo. Sveda Instituto por kulturaj rilatoj kun eksterlando, publika organizaĵo kiu uzas jam pli ol dudek lingvojn por siaj presaĵoj kaj informoj, lastatempe eldonis informilon sub la titolo «Faktoj pri Svedujo» ankaŭ en Esperanto.

En la informilo oni trovas fundamentajn faktojn pri ekzemple la geografio de Svedujo, ĝia klimato, la loĝantaro, konstitucio kaj parlamento, eksterlanda politiko, defendo, religio, ekonomio kaj industrio, sociaj avantaĝoj de la popolo, edukado kaj aliaj kulturaj aktivecoj.

Se vi deziras pli detale konatiĝi kun tiuj faktoj, bonvolu mendi la eldonaĵon, skribante al Sveda Instituto, Poŝtako 3306, Stockholm 3, Svedujo. Nepre skribu en Esperanto. Tiel vi grave substrekas la uzablecon kaj bezonon de nia internacia lingvo. Niaj kolegoj en la Sveda Esperanto-Federacio ankaŭ ĝojos kaj profitos de via grava aktiveco por subteni ilian laboron.

Blindaj esperantistoj

El la rezolucio

La partoprenintoj de la feria renkontiĝo kaj internacia feria seminario de blindaj esperantistoj — 87 personoj el 15 landoj (Anglujo, Aŭstrujo, Belgujo, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Nederlando, Norvegujo, Svedujo kaj Svislando) —

estas pretaj helpi en kampanjoj por savi homojn el la sorto de blindeco, se ili ne estas neeviteble blindaj, ekzemple en Afriko.

konstata ke en ĉiuj humanismaj atingiĝoj de la homaro ankaŭ blindaj verkistoj kaj sciencistoj ludis kaj ludas rolon sufiĉe rimarkindan,

petas Eŭropan Regionan Komitaton de Tutmonda Konsilantaro por Bono de la Blinduloj,

(a) estontece sendi oficialan delegiton al blindul-esperantistaj internaciaj kongresoj, kiel jam faras tion la nordlanda kunlabora komitato, kaj instigi la naciajn blindulunuigojn, fari same,

(b) influu en internaciaj televidaj korporacioj pri starigo de informaj programoj pri blinduloj, montreblaj pere de Eŭrovizio kaj Intervizio,

(c) sur taŭgaj vojoj klopodi ke Universala Poŝta Unuiĝo rekomendu pli taŭgan solvon ol tiu de la ĵus fiksita termino «Ĉekogramo»,

(d) instigi la ekzistantajn tiflogiajn informajn kaj dokumentajn centrojn ke ili dediĉu specialan atenton al katalogigo de nigraprese eldonitaj verkoj de blindaj muzikkomponistoj, verkistoj kaj sciencistoj, taŭge koordinante kaj specialigante siajn laborojn.

En Rheinbreitbach,

11-a de Aŭgusto, 1967

Breitenbach Komitatoestro.

ABELKULTURISTOJ ATENTU!

Estas serĉata norvega esperantista abelkulturisto, kiu estas preta kunlabori en la preparado de Esperanta-plurlingva Abelkultura Terminaro. Interesiĝantoj bonvolu turni sin al s.ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2.

La maoria raso de Nov-Zelando

En Nov-Zelando, lando de tri ĉefaj insuloj en la Suda Pacifiko, proksimume 18 000 kilometrojn for de Londono, du rasoj, Maoria kaj «pakeha» (blankuloj) faras sian eblon por vivi en harmonio kaj egaleco. En multaj landoj oni atingis tioman harmonion inter rasoj de diversaj kulturoj.

La Maorioj estas brunhaŭtaj polinezianoj. La plimulto de iliaj antaŭuloj migris al Nov-Zelando ĉirkaŭ la jaro 1350 el aliaj pacifikaj insuloj kiuj estis nomitaj Hawai-iki laŭ siaj legendoj. Kelkaj spertuloj opinias ke Hawai-iki estis la Society-aj Insuloj. Tial la lando jam estis enloĝata almenaŭ kvin jarcentojn, kiam komenciĝis organizita enmigrado de blankuloj, kaj la Traktato de Waitangi estis subskribita en 1840.

Tial Waitangi, historie la plej grava loko en Nov-Zelando, estis la loko de okazaĵo kun vastaj sekvoj al la Maoria kaj brita popoloj, kiam, la sesan de Februaro, 1840 subskribiĝis tie traktato inter Ŝia Moŝto Reĝino Viktorio kaj multaj ĉefuloj el la pli nordaj Maoriaj triboj. Per ĉi tiu traktato la Maorioj konfesis sin regatoj de la brita reĝino, kaj ŝia moŝto garantiis al ili sian protektadon de iliaj posedaĵoj, kaj etendis al ili la rajtojn kaj privilegiojn de britaj regatoj. La traktato de Waitangi estis justa kaj honesta interkonsento, per kiu Nov-Zelando fariĝis brita kolonio.

La unua vicreĝo de Nov-Zelando estis Kapitano Vilhelmo Hobson de la brita militŝiparo. Liaj instrukcioj estis, ke se li sukcesos havigi de la Maorioj cedon de sia lando al la brita reĝino, li sin nomos subvicreĝo (t. e. sub la brita vicreĝo de Nova Sudkimrujo, kiu tiutempe estris ĉiujn koloniojn en Aŭstralazio.)

Oni tamen emfazis, ke li klarigu al la Maorioj, ke «La reĝino, kiel ankaŭ ŝia tuja antaŭulo, malpretendas por si mem kaj siaj regatoj ekposedi la insulojn de Nov-Zelando aŭ regi ilin kiel parton de la regno de Britujo, se oni antaŭe ne ricevas la liberan kaj inteligentan konsenton de la indiĝenoj, esprimitan laŭ ilia kutima maniero.»

Plena Libera Diskuto

Hobson alvenis en la Bajo de Insuloj en la militŝipo «Heroldo» la 29an de Januaro, 1840, kaj tuj aranĝis kunvenon kun la

Maoriaj ĉefuloj. Li alteriĝis ĉe Waitangi la kvinan de Februaro, kaj la kunveno okazis en tendego lokita, kie nun staras la flagstango.

Oni zorge klarigis la traktaton al la Maorioj, kaj plena kaj libera diskuto okazis per interpretisto. Poste la ĉefuloj paroladis al siaj sekvantoj antaŭ ol anonci, ke ili pretas subskribi la traktaton.

Hobson denove renkontis la ĉefulojn en la tendego la postan tagon, kaj atestis al ilia subskribo. Poste oni portis kopiojn de la traktato al Maoriaj loĝejoj tra la lando, kaj la lokaj ĉefuloj, kiam malmultaj esceptoj, aldonis siajn subskribojn — plej ofte bildo de sia tatuado. Tiel pace, kaj laŭ la volo de la popolo, Nov-Zelando venis en la britan imperion.

La pratempaj Maorioj estis raso kun multaj noblaj trajtoj. Ili estis viroj fortaj, militemaj, kuraĝaj kaj justaj, kaj oni kredas, ke ili havis tre grandan sukceson pri navigado antaŭ 600 aŭ pli da jaroj. Iliaj tradicioj rakontas pri alveno en Nov-Zelandon per transmariraj kanotoj el aliaj landoj malproksimo en la nordo, iam inter 1200 kaj 1400 jaroj post Kristo.

Ili ne havis skribitan lingvon, sed ili estis oratoroj kaj poetoj, kaj per la parolata vorto ili transdonis de generacio al generacio veran trezoron de scio enhavanta multajn rakontojn kaj kantojn, kiuj estis parte historiaj kaj parte legendaj. Ankaŭ ili estis artistoj kaj tre lerte fabrikis per primitivaj iloj. Skribita lingvo estis provizita — de frutempaj blankaj misiistoj kaj instruituloj; ĝia prononco tre similas al la Esperanta.

La Maoria raso nun estas proksimume 180 000 laŭnombre en tuta loĝantaro de 2 500 000. Do, ili estas sep procentoj de la tuta loĝantaro.

En la frua epoko de blankula enloĝado disputoj ofte okazis kun la Maorioj, precipe pri la tero, kaj tiuj okazigis militojn inter la du rasoj. Pro ĉi tiuj militoj kaj pro malsanoj la nombro de Maorioj malkreskis ĝis malpli ol 45 000 en 1896.

Simbolo de Daŭra Vivo

Kredante, ke ili tiam jam estos formortintaj, elstara civitano de Auckland testamentis monsumon por starigi monumenton al ili en la jaro 1940. La monumento estis konstruita,

sed nun ĝi simbolas la daŭran vivon de la raso.

Ĉirkaŭ 1900 aperis grupo de tre lertaj kaj bone edukitaj Maorioj, kiuj starigis la Junan Maorian Partion, dediĉitan al la bonstato de la Maoria raso. Samtempe sinsekvaj registaroj fariĝis pli kaj pli viglaj por protekti kaj antaŭenigi la bonon de la raso, insistante je plena egaleco inter la Maorioj kaj la blankuloj. Rezulte de ĉio ĉi miriga plibonigo en la nuna jarcento de kaj la nombro kaj la stato de la Maorioj.

La nuna kreskorapido de la Maorioj — pli ol 3,6 procentoj jare — estas unu el la plej rapidaj en la mondo, kaj pli ol duoble de la procento ĉe la blankuloj.

Nuntempe la Maorioj estas juna popolo; pli ol 60 procentoj de ili estas malpli ol 21-jaraj, kompare kun 40 procentoj de la blanka loĝantaro. Ili estas ankaŭ kampara popolo, proksimume 60 procentoj loĝas en la kamparo. Tamen la rapida kresko de la Maoria loĝantaro instigas al multaj junaj Maorioj ĉiujare forlasi sian kamparan izolecon kaj migri al centroj de industrio. Ĉi tiel la proporcioj en la urbo kaj la kamparo rapide ŝanĝiĝas.

Kie diferencoj ekzistas inter la administrado de aferoj ĉe Maorioj kaj blankuloj, ili celas protekti la Maorian kaj helpi lin progresi en sferoj, kie la adopto de nova kulturo kreis specialajn malfacilaĵojn por li. La ĉefaj sferoj kie administrataj diferencoj okazas estas rilate la ekspluato de tero, edukado, sano kaj domkonstruo. Ili devenas de la malsamaj kulturoj de Maorioj kaj blankuloj.

La alfrapo de tre organizita, komplika kaj konkura Eŭropa civilizacio kontraŭ la Maoria popolo, kies tradicioj kaj kutimoj baziĝis sur komunuma vivo, kreis grupon da problemoj por kiuj oni devis krei specialan administran solvon.

Ŝtatestoj kaj Kleruloj

La Maoria raso naskis elstarajn ŝtatestojn kaj klerulojn, el kiuj iuj atingis internacian famon. Kavaliro Apirana Ngata, Doktoro pri Literaturo, Magistro de Artoj, Licentiato de Leĝoj, estis pioniro en multaj sociaj kaj ekonomiaj reformoj, speciale pri la utiligo de la tero por la bono de sia raso. Li deĵoris ĉe pluraj ministroj, kaj iam estis anstataŭa ĉefministro.

Kavaliro Jakobo Carroll estis alia elstara

Maoria ŝtatesto, kiu estis ministro dum multaj jaroj, kaj plurfoje agis kiel anstataŭa ĉefministro. Kavaliro Petro Buck, ano de la Ordeno por Elstara Servo, Doktoro pri Literaturo, pri Scienco kaj pri Medicino. Magistro de Artoj, konata tra Polinezio kiel Te Rangihiroa, atingis renomon kiel antropologo. Li estis profesoro de antropologio ĉe la Yale-a Universitato en Usono, kaj estro de la Bishop-a Muzeo en Honolulo.

Kavaliro Maŭi Pomare estis alia viro, kiu diplomigis en medicino kaj ankaŭ elstaris kiel ministro. Alia elstara Maoria ĉefulo estis la Tre Respektinda F. A. Bennet, Episkopo de Aotearoa. (Aotearoa estas la Maoria nomo de Nov-Zelando, signifante Lando de la Longa, Blanka Nubo.) Alia ano de la sama familio, Kolonelo Bennet ĵus agis kiel nia reprezentanto en Malajujo. En la sfero de muziko ĉi tiu nature muzikema raso naskis kelkajn konatajn kantojn — plej elstara nun estas Inia te Wiata.

La Maoria raso havas siajn reprezentantojn nuntempe en la plejmulto de profesioj kaj metioj, sed ne en la sama proporcio kiel ĉe la blankuloj. Helpe al la plibonigo de ĉi tiu situacio oni starigis Maorian Edukadan Fondadon por helpi al elektitaj Maoriaj studentoj kvalifikiĝi por la enterpreno de profesioj aŭ metioj.

Ĉi tiu fondaĵo estas malavare subtenata de kaj Maorioj kaj blankuloj, kaj ricevas subvencion de la registaro. Ĝi estas, do, simbolo de la firma decido de ĉiuj Nov-Zelandanoj ke Maorioj kaj blankuloj kununuigu kiel unu popolo.

Ekzistas ankaŭ en Nov-Zelando vigla movado celanta konservi kiom eble el la pratempa kultura heredaĵo aŭ «Maoritanga». Kelkaj el ĝiaj plej fervoraj subtenantoj estas Eŭropanoj. Neeviteble la moderna vivo havas efikon, tiel ke la tradiciaj militdancoj aŭ haka-oj, aliaj dancoj pantomimaj kantoj kaj kantoj nun iafaĵe respegulas okazaĵojn de nia epoko. La Maorioj kun rekta kaj vigla maniero kaj foje kun malica humoro, kiuj estas tipaj ĉe ili, adoptis kun ŝanĝoj Eŭropan muzikon, de himnoj ĝis popularaj modernaj kantoj.

Diskoĵ, Sonbendoĵ

Multe el la rezultanta muziko estas nun havebla de Nov-Zelando el longludaj diskoĵ, kiuj plaĉas al ĉiu aŭskultanto. Diskoĵ de 45 rpm estas havebla el la Nov-Zelando

RECENZOJ

TURISMAJ BROŝUROJ

Steiermark, plurlingva, multkolora faldprospekto, kun Esperanta aldono «La verda Stirio — feria revuo». Petu ĉe: Landesfremdenverkehrsamt für Steiermark, Herrengasse 16, Graz, Aŭstrujo.

Niederösterreich, Esperanta broŝureto begala. Petu ĉe: Niederösterreichisches Landesfremdenverkehrsamt, Herrengasse 13, Wien I, Aŭstrujo.

Graz, germanlingva broŝuro kun Esperanta aldono. Petu ĉe: Magistrat Graz, Amt für Kultur, Sport und Fremdenverkehr, Graz, Aŭstrujo.

Vichy, Esperanta faldprospekto, tre bela. Petu ĉe: Syndicat d'Initiative, Office de Tourisme et Thermalisme, 19 rue du Parc, Vichy, Francujo.

Mobács, hungarlingva broŝuro kun Esperanta aldono, kaj *Pécs*, bela *Esperanta* broŝuro. Petu ĉe: Baranya megyei Idegenforgalmi Hivatal, Széchenyi tér 9—11, Pécs, Hungarujo.

Esperanto Asocio, Post Office Box 181, Upper Hutt, New Zealand. Prezo, 12/6 (25 steloj) inkl. afrankon. Ili havas Esperantan klarigon kun la diskoj. Sonbendigita programo pri la Maoria raso kaj ĝia muziko, pretigita de 8-ro Davido MacGill D.B.E.A., edukada oficisto de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio estas unu havebla de la magnetofona servo de UEA (v. la jarlibron pri detaloj).

La programo estas prezentita de Wixi Puketapu de Wellington, en Esperanto. Ĉi tiu plaĉa junulino havas ambicion fari sian eblon konservi la kulturon kaj tradicion de sia raso. Ŝi kredas, ke Esperanto helpos tiucele, enkondukante la Maoriojn al interesiĝado en ĉiu lando. Ŝia surbendigita historio rakontas pri la alveno de la Maorioj en Nov-Zelando: ŝi vivigas la historion kantante pluraĵajn kantojn, memakomponente per gitaro.

Berlin, Esperanta faldprospekto kun urbo-plano. Petu ĉe: Trafikoficejo Berlin, Germanujo.

*

Walter Trobisch: Mi amis junulinon. Konfidenca korespondado pri la unua amaventuro de juna afrika instruisto, kiu pasie oponis kontraŭ la seksmoraleco de la eklezio. La leteroj estas aŭtentikaj. Eld.: Editions Trobisch, Baden-Baden, 1966. 140 p., broŝ., prezo: DM 6,—.

Kantoj de dekvin sovetaĵaj republikoj. Kun muziknotoj. Eld.: Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaĵaj Esperantistoj, Moskvo, 1966. 98 p., broŝ.

Por la paco. Artikoloj, kantoj, bildoj. Eld.: Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaĵaj Esperantistoj, Moskvo, 1966. 98 p., broŝ.

POEMOJ DE HO CHI MINH

Ho Chi Minh: Tagkajero en prizono. Broŝurita, 108 paĝa. Eldonis: Fremdlingva Eldonejo Hanojo 1966.

Konante la nomon oni tuj ekpensas: Jen denove longaj, propagandaj paroladoj. Sed ne. Vidante la titolon: nu, propagandoplenaj priskriboj de kontraŭkomunistaj fiagoj. Sed ne.

Temas pri poemaro. Oni trovis similajn en la malliberejoj dum la dua mondmilito. Politike malliberitoj — certe je ĉiuj flankoj — uzas sian mensan energion, ne alie uzeblan, al verkado. Kaj en tiu ĉi libro ni renkontas vere grandan menson, kiu per sentoplenaj poemoj liberigas la ĉenitan korpon pere de libera spirito.

Kelkfoje la poemoj ne estas facile kompreneblaj, eĉ malgraŭ komentaj notoj de la eldonistoj. Sed ja estas el fremda mondo!

Tamen, eĉ se el fremda mondo, la homaj trajtoj estas la samaj. Kaj multaj el la poemoj povus deveni el politika malliberejo en Norvegujo dum la okupacio.

Haro.

BROŝURO

Si ikke at det er overflødig, også du kan bruke Esperanto, verdensspråket.

Norske Jernbanemenns Esperantoforbund faris belan, multobligitan broŝuron 24-paĝan por propagandi nian lingvon inter la fervojistoj. La duonon de la paĝoj ili uzis por

koncizaj informoj pri la lingvo, pri Zamenhof, pri la organizaj kaj kulturaj valoroj. La dua duono estas gramatiko kaj fervojista glosaro. Komprenble la kajero estas norveglingva. Gratulon, Fervojistoj!

HAR

ANEKDOTOJ

Bona Rido . . . Anekdotaro kolektita kaj esperantigita de Axel A. Helm, ilustrita de Lennart Spove. Eldonis Eldona Societo Esperanto, Malmö. Prezo 7.50 sv. kr.

Certe estas, ke bona rido plilongigas la vivon. Almenaŭ laŭ la proverbo. Kaj jen ni ricevis anekdotaron en la internacia lingvo. Multaj anekdotoj ja estas jam konataj, sed ankaŭ estas tute novaj. Tio ja dependas de la leganto.

La kajero, 85-paĝa, kun siaj pli ol 300 anekdotoj kaj historietoj ne logas al kontinua legado, sed certe al gustumado, — jen io, jen alio. La desegnaĵoj estas al tiu ĉi libro desegnitaj, do ne estas la samaj, kiujn oni povas trovi en la albumetoj de la kliŝovendejoj.

Mi povas rekomendi la kajeron, ĉar ankaŭ la lingvaĵo estas senpere komprenebla al tiuj kiuj lernis nian lingvon, kaj ne kaŭzas penojn por malfacilaj glosoj. Tial kaj tiel oni povas ĝui la spritaĵojn tuj dum legado, kaj ne nur post cerbumado. Bonan apetiton!

Haro.

LEGENDO

A. Núñez Dubús:
Eterneco, Navarra legendo.
14-paĝa kajero. Eldono de la Hispana Esperanto Federacio, Zaragoza.

Kio kaj kia estas la eterneco? Tiu religia kaj filozofia demando instigis al multaj pensoj. En tiu ĉi navarra legendo, ĉarme rerakontita per facileflua, graciaj versoj, la abato Virilo — kiu vivis en la komenco de la deka jarcento — cerbumas, — kaj eĉ travivas eternecon dum birdo kante trilas.

Kvankam la kajero estas bela kaj plaĉa, mi ne povas prisilenti kio estas en miaj okuloj makulo: Sur ĉiu paĝo estas tri strofoj — kun abundo da libera spaco sube al kvara. Tiu libera spaco ĝenas. Kaj: En la antaŭvorto mi trovis la mallongigon «fraŭ»!

HAR

LAO-PATRIOTOJ

Indaj gefiloj de la Lao-popolo.
Eldonis: Neo Lao Haksat-Eldonejo
1966. 100-paĝa.

Oni diras: Jen la unua esperanto-libro el Laos. Permesu ali ni etan dubon: Ĝi alvenis en koverto el Norda Vjetnamio. Adreso de la eldonejo ne estas en la libro.

La libro konsistas el 7 rakontoj pri Laopatriotoj kiuj batalis pri sia opinio pri libera lando kaj popolo. Oni ja devas diri pri ili, ke ili agas heroe, laŭ sia konvinko.

Samtempe oni, kompreneble, kiel ĉiam, kiam temas pri komunista literaturo, trovas absolutan nekomprenon, ke aliaj homoj povas havi aliajn opiniojn, kaj ke multaj, eble la plej multaj, ne deziras komunistan liberecon. Pri tiuj, kiuj defendas sian landon laŭ ĝia nuna stato, oni nur legas «la Usonanoj kaj la pupaj soldatoj».

Do la libro ne estas nur rakontoj pri heroaj defendantoj de konvinko, sed ankaŭ politika propaganda pamfleto sen iuj ajn nuancigoj.

HAR

ĈINAJ POLITIKAJ BROŝUROJ

Fremdlingva Eldonejo, Pekino, eldonis 6 novajn, malgrandajn broŝurojn:

Maŭ Zedong: «Servu al la Popolo» kun du artikoloj el 1939 (pri kanada kuracisto falinta dum la revolucio en Ĉinujo) kaj 1944 (funebre al ĉina komunista gvidanto).

«Deŝiri la maskon de 'Libereco, Egaleco kaj Frateco' de la burĝaro», ĉefartikolo el «Popola Ĵurnalo» 4.6 1966, kie oni atentigas, ke tiu libereco estas «libereco por plendi, ke la dekstraj oportunistoj estis maljuste traktitaj», sed «nia socialisma sistemo certe ne permesas liberon de parolado al ĉiuj kontraŭrevoluciuloj.»

«Alte tenu la grandan ruĝan flagon de la penso de Maŭ Zedong, aktive partoprenu en la granda socialisma kultura revolucio», ĉefartikolo el «Ĵurnalo Liberiga Armeo», kie oni i. a. diras: «Necesas forigi superstiĉon pri la klasika literaturo en- kaj eksterlanda.»

«Pri 'trifamilia vilaĝo» de Jaŭ Venjuan, respondo al du artikoloj en ĉinaj gazetoj.

«Komuniko de la deknua plena sesio de la oka centra komitato de komunista partio de Ĉinio.» Tiu plena sesio okazis en Pekino en la komenco de aŭgusto 1966, kaj i. a. pri-

traktas pri la «Granda Proleta Kultura Revolucio».

«Vivu la Granda Proleta Kultura Revolucio», ĉefartikolo el «Ruĝa Flago» n-ro 8/1966.

*

Nun, kiam la rezultoj de tiu granda kultura revolucio estas jam konataj dise en la mondo, tiuj pamfletoj estas interesaj kaj rekomendindaj al tiuj, kiuj deziras kompreni la evoluon en la plej granda komunista regno sur nia tero.

HAR

SIMPLAJ FLOROJ,

melodioj kaj tekstoj de Ramona van Dalsem (por kanto kaj piano). Eld. Dansk Esperanto Forlag, Åbyhøj, Danlando. 24 p., Prezo. 9,- d.kr. (Danaj kronoj.)

Jen nova «stelo» sur la Esperanta firmamento, kiu ne nur scias bele kanti, sed ankaŭ verkas bonajn tekstojn kaj ĉarmajn melodiojn.

La kantoj estas ĝenerale bone komponitaj kaj facile kanteblaj. Mi tamen volas fari kelkajn rimarkigojn. En kanto n-ro 1, «*La feliĉo*» ŝajnas esti 4 supernombroj taktoj: «Ĝi ne vivas en grandegaj riĉaj domoj aŭ en la agoj de festamentaj homoj.» Ordinare la nombro de taktoj en ordinara kanto devas esti 16 — 24 — 32, en frazoj je po 4 taktoj. N-ro 3 «*La Eho*» estas facile kantebla, bela melodio. N-ro 5, *La eta konkuranto*, en kiu s-ino Dalsem kantas konkure kun sia kanario, estas ĉarma melodio, kvankam la taktoj, «trile, kaj sen» kaj «niko, tamen» povas kuntiriĝi al po unu takto. *La letero* sekvas la skemon 4 + 16 taktoj. Bona melodio. *La printempo* estas iom komplika muzike, sed perlo de poeziaĵo. Tiel ankaŭ «*Pento*». La *tango «Romantiko»* estas trovo (muzike kaj poezie). Anstataŭ la 5 bemoloj oni povas altigi ĝin per duontono ĝis d-majora. La lasta melodio «*Al suna optimismo*» estas gaja melodio, konvena por kantado en klubkunveno.

Kun la supraj rezervo mi rekomendas la kantlibron al la kluboj, precipe por kanzupoj, — por kantado kaj dancado, jes, ankaŭ por deklamado, kvankam la metriko estas iom libera, sed des pli enhavoriĉa estas la poemoj. Ĉi tiuj dek kantoj meritas la atenton de la Esperantistoj de ĉiuj landoj.

H. Fr.

UNESKO- novaĵoj

UNUA JUNULAR-GASTEJO EN TANZANIO

Antaŭ nelonge ekfunkciis en Kinondoni, kvar mejlojn (7 km) for de Daresalamo la unua junular-gastejo de Tanzanio. Ĝi havas litojn por 16 personoj.

EN BRITUJO: CENTRO POR STUDOJ POR RAS-PERSEKUTO

La ekstermado de hebreoj, slavoj kaj ciganoj fare de la nazioj kaj la grandaj ĉasoj al «sorĉistinoj» dum la 15-a kaj 16-a jarcentoj — jen du el la temoj nun studataj en la nove fondita Centro por Esploroj pri Kolektiva Psikopatologio ĉe la Universitato de Sussex, Britujo. Oni priskribas la laboron tie faratan per la termino «kolektiva psikopatologio», ĉar temas pri persekutaj movadoj, en kiuj homoj, kiuj unuope estas mense normalaj, kolektive kondukas kiel psikomalsanuloj. La direktoro de la Centro estas profesoro Norman Cohn. Li klarigis, ke tiaj psikomalsanaj persekutantoj tipe rigardis siajn viktimojn kiel ne tute homajn. Pro tio ili povis senskrupule persekuti kaj ofte eĉ ekstermi ilin.

La centro en Sussex estas la unua tia en la mondo, sed jam aperis dua centro en Usono, kiu studas ras-malamon. Oni esperas, ke poste estos pluraj interligitaj centroj en diversaj partoj de la mondo.

EN MEKSIKO LA PLEJ GRANDA PIRAMIDO

Ekspedicio sub gvido de s-ro Miguel Mesmacher malkovris ĉe Cholula, ĉ. 70 mejlojn (120 km) for de Meksik-urbo, piramidon, kiun oni opinias la plej granda de la mondo. La piramidon — ĉ. 990 futojn (300 m.) larĝa kaj longa, kaj ĉ. 195 futojn (60 m.) alta — ĉirkaŭas kvar pli malgrandaj piramidoj kaj diversaj aliaj konstruaĵoj. Oni opinias, ke la tuto formis ritan centron uzatan kelkajn jarcentojn antaŭ la alveno de la hispanoj. La Meksika Registaro planas evoluigi tie la plej gravan arheologian turisman centron de Meksiko.

La Granda Piramido de Gize estas ja pli alta (ĉ. 450 futojn; 140 m.), sed malpli longa kaj larĝa (ĉ. 720 futojn; 220 m.).

(Lau Unesco Features kaj Informa Servo de UEA.)



FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA
FERVOJISTA ASOCIETO — NEFA

Redaktoro: Odd Kolbrek, Kallbakkstubben 22,
Oslo 9

RAPHAM

Feriohotelo kaj kurscentro por la fervojistaro

En 1959 la fervojadministracio kune kun la fervojista kaj la lokomotivista sindikatoj ekprilaboris konstruoplanon de fervojista feriohejmo.

Fondiĝis komitato, kies tasko estis esplori la aferon, kun jenaj membroj: Direktoro pri bonfartaj aferoj Erling Kiil, prezidanto de Norvega Fervojista Sindikato Emil Edvardsen, kaj prezidanto de Norvega Lokomotivista Sindikato Oluf Anfinsen.

Poste fondiĝis akcia societo — Jernbanepersonalets ferie- og rekreasjon A.s., kun NSB kaj la du menciitaj sindikatoj kiel akciposedantoj kun la jenaj en la estraro: Direktoro por bonfartaj aferoj Erling Kiil, daŭre ĝeneraldirektoro H. E. Stokke kaj la sindikatprezidantoj Emil Edvardsen kaj Oluf Anfinsen.

En 1963 la komitato aĉetis la terenon Rapham en la altmontaro supre de Otta en Gudbrandsdalen, en alteco de 1000 m. super la marnivelo, de kies situo estas mirinde bela panoramo kaj al la valo, kaj al la Rondanemontaro.

En 1965 komenciĝis la konstrulaboro, kiu daŭris ĝis aŭtune 1967. La feriohejmo estas luksa kaj tute moderna turisthotelo, kiu kovras terenon de 3000 m², ĝi povas akcepti 140 gastojn en siaj luksaj ĉambroj, kaj se estas malbona vetero, kaj ne estas eble ekskursi en la grandioza pejzaĝo, la gastoj povas fari gimnastikon en sporthalo, ludi bowlingo, aŭ nur ripozi antaŭ la fajrejo, aŭ en la biblioteko.

Cetero estas granda kunvenhalo, aranĝita kiel aŭditorio, kaj tiel konvena kiel kursejo; tie ankaŭ ni fervojistaj esperantistoj rajtas aranĝi kursojn.

La 7an de septembro solene inaŭguriĝis Rapham.

Proksimume 100 personoj invitiĝis — inter aliaj trafikministro Håkon Kyllingmark, ĝeneraldirektoro Edvard Heiberg de NSB, kaj lia antaŭulo, H. E. Stokke, parlamentano, antaŭa trafikministro Trygve Bratteli, la sindikatprezidantoj P. Mentzen, Emil Edvardsen kaj Oluf Anfinsen, kaj la prezidantoj de la diversaj fervojistaj libertempasocioj — inter aliaj la subskribinto, kiel prezidanto de NEFA.

La ĝeartoprenantoj vojaĝis en kromvagonoj en la tagtrajno Oslo Ø—Trondheim, al Otta, kaj du ĉarmaj trajn-vartistinoj regalis nin per kafo kaj bongustaj buterpanoj.

De Otta stacio al Rapham ni veturis per aŭtobusoj, kaj post agrabla bonvensaluto de komitato, ni iris al abunda lunĉo.

Sub gvidado de Direktoro pri bonfartaj aferoj Erling Kiil, ni trairis la hotelon, kaj en la kunvenhalo ni sidis, kiam li montris la arhitektdesegnaĵojn kaj rakontis pri la konstrulaboro.

Sekvis kelkaj salutparoladoj kaj transdonado de donajoj al la hotelo. Dum la brila festmanĝotablo, kie sindikatestro Emil Edvardsen estis eminenta toastestro, parolis direktoro Erling Kiil, ĝeneraldirektoro Edvard Heiberg, sindikatprezidanto P. Mentzen kaj trafikministro Håkon Kyllingmark.

Post agrabla kunestado, la aŭtobusoj transportis nin al Otta, de kie ni revojaĝis per dormtrajno al Oslo.

Per Johan Krogstie.

MAGNUS CARLSEN 70-JARA

La 6an de oktobro la honora membro de NEFA, kiu estas inter tiuj kiuj fondis la fervojistan Esperantomovadon en nia lando, Magnus Carlsen, festis sian 70-jaran jubileon.

Esperanta literaturo al UB

La Universitata Biblioteko en Oslo havas inter alie la devon kolekti aŭ registri ĉiujn librojn kaj artikolojn skribitajn fremdlingve de norvegoj kaj presitajn eksterlande. Tion ĉi oni nun komprenas tiel ke la biblioteko ankaŭ devas kolekti aŭ registri esperantan literaturon kreitan de norvegoj. La antaŭkondiĉo estas ke la artikoloj k.t.p. estas presitaj.

Mi proponis al la estro de la norvega sekcio de la biblioteko, ke ni ankaŭ kolektu manuskriptojn, kondiĉe ke ili estas skribitaj per skribmaŝino sur ordinara A-4 paperfolioj. Ni ĉiuj scias, ke ne estas facile por esperantistoj eldoni esperantlingvajn librojn aŭ publikigi artikolojn, kaj estas bedaŭrinde ke materialo, kiu jam estas preta, nur kuŝas en la tirkesto. Pensu pri la manuskriptoj por la multaj bonaj prelegoj kiujn niaj samideanoj faris dum klubkunvenoj.

La estro apogis mian proponon, kaj tiel Vi nun povas sendi Viajn maŝinskribitajn manuskriptojn al la biblioteko (adresitajn al mi). Kiam ni havas sufiĉe da materialo, ni bindigos la materialon tiel kiel ni nun faras koncerne «Universitetets kronikttjeneste». Ĉiu volumo devas enhavi minimume 100 paĝojn. Poste ĉiu esperantisto povas prunte-doni la verkon.

Kiam IFEF fondiĝis, dum fervojista kunveno en Århus en Danlando en 1948, Magnus Carlsen ĉestis, kaj kiam li post tiu kunveno revenis al Norvegujo, li faris grandan laboron por kolekti la esperantistojn inter la norvega fervojistaro en unu tutlandan asocion. Tiamaniere NEFA naskiĝis, kaj Magnus Carlsen elektis prezidanto. En tiu ofico li estis ĝis 1962, kaj li kreis bonegan rilaton kaj al Norvega Ŝtata Fervojo, kaj al la sindikatoj.

Koncerne nian aferon Esperanto, Magnus Carlsen ĉiam estas optimisto, kaj dum la klubvesperoj en la fervojista Esperantoklubo de Oslo ni ĝojas pro lia fidela amikeco, kaj lia ĉiam bona trankvila rideto.

Ni kore gratulas, kaj deziras al li ĉion bonan, kaj ke li troviĝu inter ni, sana kaj feliĉa dum multaj jaroj.

Liaj amikoj

Ĝis nun ni nur havas miajn proprajn manuskriptojn, entute 32 paĝojn:

1. traduko de la poemo Regnbuen de André Bjerke, muziko de Asbjørn Sylslak,
2. traduko de la norvega konstitucio,
3. artikolo pri la ŝtataneco en la juro de diversaj landoj: Norvegujo.

Ne gravas ĉu la manuskriptoj jam estas presitaj aliloke, ekzemple en faka revuo.

Ĉiujare mi povas doni liston en nia gazeto pri la ricevitaj prelegoj k.t.p.

Nia celo nun estas: kompletigi la unuan volumon en 1967.

T. A. Høeg,
Universitetsbiblioteket,
Drammensvn. 42, Oslo 2.

LA PROPAGANDA FONDAĴO

La kronrulado al la propandfondaĵo de N.E.L. daŭras ankoraŭ. Kiel antaŭe oni pagas kr. 5,00 (aŭ pli!) al postĝiro-konto 20.02.80 aŭ bankĝiro-konto 100.000/40 (Akers Sparebank, Oslo). Ĉiuj donacoj estas uzataj nur por celoj propagandaj aŭ informaj. Nia asocio bezonas monon por disvastigi la konon pri Esperanto al la granda publiko. Do donu afeble vian kontribuon! por La Financa Komisiono de N.E.L.

John Berggreen,
prez.

LA 5-KRONRULADO — LISTO 13:

John Stenstrom, Jønkøping kr. 25,00
Kjell Gustavsen, Oslo » 5,00
Lars Gustavsen, Oslo » 5,00
Aase Gustavsen, Oslo » 5,00
Astrid Berggren, Oslo » 5,00
John Berggren, Oslo » 5,00
	Sume kr. 50,00

Lastmomente:

ESPERANTO-KURSO EN «SARPEN»

La taggazeto «Sarpén» en Sarpsborg ĉiam estas tre pozitiva en sia sinteno al Esperanto. Nun la redakcio ĵus komencis publikigi Esperanto-kurson por siaj legantoj. La kurso, kiu estas ilustrita per fotografioj kaj desegnaĵoj, estas originale verkita por «Sarpén», kaj en la titolo estas la du vortoj SARPEN kaj ESPERANTO. Unu leciono kovras prok-

På norsk

HENVENDELSE FRA 73 MILLIONER VENTER I FN-SEKRETARIATET

I sammenheng med Året for Internasjonalt Samarbeid ble det i oktober i fjor overrakt FN's sekretariat en henvendelse til FN undertegnet av nesten en million enkeltpersoner og omkring 4000 organisasjoner med 73 millioner medlemmer. Henvendelsen oppfordrer FN til å støtte bruken av det internasjonale språket Esperanto.

Verdenskongressen for Esperanto i Rotterdam i høst fastslo at FN's sekretariat hittil ikke i noen form har kunngjort noe om henvendelsen og heller ikke har tatt skritt for at den kan bli behandlet av noen instans i FN.

En enstemmig resolusjon fra kongressen påpeker at én av de grunnleggende menneskerettigheter, anerkjent av alle siviliserte folk, er retten til å gjøre henvendelser og

simume kvaronan paĝon. (Parenteze ni menci-
ciu ke la gazeto kompreneble pagas hono-
raron al la verkinto de la kurso, tiel ke ne
temas pri la kompleksa favoro).

Estas tre grave, ke la norvegaj esperantistoj nun skribu al la redakcio, menciante, ke ili informiĝis pri la kurso (sed nepre ne menci-
u, ke la informo venas de Norvega Esperantisto). Aĉetu ekzempleron de la koncerna numero. Direktu la leteron al la ĉefredaktoro. Favore impresos, se vi diras, ke vi bezonas du aŭ tri ekzemplerojn, por sendi al eksterlandaj amikoj, aŭ ion similan.

Kunlige kun tio: ĉiam pli da taggazetoj nun transiras al ofseta presmetodo. Tiu metodo ebligas vastan uzadon de bildoj kaj permesas fidelan redonon de skribmaŝina teksto (kiel faras Sarpén: ĝi simple redonas la tutan «manuskripton»). Se vi konas la redaktoron de iu ofseta taggazeto, montru al li la kurson de «Sarpén», kaj proponu, ke ĝi faru similan kurson. Se vi ne mem kapablas verki tian kurson, petu, ke la redaktoro kontaktigu kun Norvega Esperantista Ligo (aŭ eble kun la redaktoro de «Sarpén»).

Ni almenaŭ nun utiligu — kaj tuj! — ĉi tiun novan okazon!

53-a Universala Kongreso de Esperanto 1968 - Madrid - Hispanujo

PROVIZORA PROGRAMO

La 53-a Universala Kongreso de Esperanto komenciĝos la 3-an kaj fermiĝos la 10-an de aŭgusto 1968.

La kongresaj ĝiĉetoj estos malfermitaj kaj fincios jam vendredon la 2-an de aŭg.

I. Manifestacio antaŭ la kongreso
Anoncota.

forslag og få svar på dem. Resolusjonen uttaler håpet om at sekretariatet i 1968, Menneskerettighetenes År, vil ta sin uforståelige holdning opp til ny overveielse og foreta nødvendige skritt for at henvendelsen kan komme til normal behandling i FN. Universala Esperanto Asocio's ledelse blir anmodet om å følge sakens videre utvikling og holde de organisasjoner som har sluttet seg til henvendelsen, underrettet om hvordan den blir behandlet av sekretariatet.

Blant enkeltpersoner som har sluttet seg til henvendelsen, er et betydelig antall ledende personligheter i alle verdensdeler, i Norge blant andre statsminister Per Borten, statsrådene Kjell Bondevik, Helge Seip og Egil Aarvik, tidligere statsråder Aase Bjerkholt, Halvard Lange, Trygve Lie og Helge Sivertsen, professor Hans Vogt, ordfører Brynjulf Bull og forfatteren Thor Heyerdahl.

NYTT ESPERANTO-FRIMERKE

Postverket i Tsjekkoslovakia har nettopp sendt ut et frimerke med tekst på tsjekkisk og Esperanto. Foranledningen til at dette merket er utgitt, er en verdensutstilling av frimerker som skal holdes i Praha i 1968, og som postverket allerede nå gjør reklame for med en serie på 7 to-språklige merker. Dette frimerket blir det 49. i verden med tekst på det internasjonale språket, er trykt i fem farger og har frankeringsverdi 5 tsjekkiske kroner.

II. Kongresaj laboroj

1. Generalaj kunvenoj de U.E.A.
2. Fakaj kunvenoj
3. Komitato de U.E.A.
4. Estraro de U.E.A.
5. Akademio de Esperanto

III. Kulturaj kaj artaj programoj

1. 4-a Internacia Arta Festivalo
2. Teatraj prezentadoj
3. Internacia Somera Universitato
4. Belarta Konkurso
5. Oratora Konkurso
6. Hispana Vespero

IV. Festoj

1. Interkona Vespero
2. Solena Inaŭguro
3. Kongresa Balo
4. Bankedo
5. Junulara Vespero
6. Ekskursoj
7. Solena Fermo

V. 11-a Internacia Infana Kongreseto

VI. Postkongresaj aranĝoj

Postkongreso estas antaŭvidita en Zaragoza.

GENERALAJ INFORMOJ

Konstanta adreso:

53-a Universala Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Aliĝoj:

La aliĝantoj sendu la aliĝilon kaj la koncernan pagon al la sama adreso (ne, ekz., la aliĝilon al Peranto kaj la pagon al la adreso de la Kongreso, aŭ inverse). *La aliĝiloj devas esti klare skribitaj, por ke la mencio en la Kongresa Libro estu senerara.*

Kotizo:

La kotizo inkluzivas la tutan programon de la Kongreso, escepte de la ekskursoj kaj bankedo, kaj la rajton utiligi la Loĝigan Servon de la Kongreso. La kotizo devas esti antaŭpagita, kaj ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto ne partoprenos en la Kongreso. Persono kiu pagas la aliĝkotizon por alia, antaŭvidu tion.

Neniu aliĝilo estos traktita antaŭ ricevo de la koncerna pago.

Rabatoj:

1) Individua membro de U.E.A., kiu ricevas la Jarlibron kaj la Revuon «*Esperanto*», *rajtas rabaton de 20,00 ned.gld. (330,00 pes.)*;

2) Individua membro de U.E.A., kiu ricevas nur la Jarlibron, *rajtas rabaton de 10,00 ned.gld. (165,00 pes.)*;

3) Edz(in)o de individua membro (de ambaŭ kategorioj) *rajtas rabaton de 5,00 ned.gld. (82,50 pes.)*.

La rabatoj ne validas por aliaj familianoj, gejunuloj, studentoj, blinduloj.

N.B.

Kongresano (ne edz-in-o kaj alia kategorio), kiu pagas la planan kotizon, *ricevas la Revuon «Esperanto» dum la tuta kongresa jaro.*

Donacoj:

La donacoj montras la solidarecon de la esperantistoj. Oni povas sendi donacojn por la jenaj celoj:

Literatura Kaso: Ĝi kontribuas al la valoro de la premioj por la Belarta Konkurso.

Blindula Kaso: Ĝin utiligas la Blindula Kongreso.

Adopta Kaso: Per ĝi estas helpataj esperantistoj en landoj, kie la transsendo de mono estas malfacila aŭ malpermesita.

Adoptaj Gepatroj: Per tiu ĉi Fondajo estas helpataj infanoj, kiuj alimaniere ne povus partopreni en la Infana Kongreseto. La minimuma kontribuo estas 30,00 ned.gld.

Orienta literaturo

MALSATA ŜTONO

de Rabinranath Tagore

Sep rakontoj el Hindujo

Bindita: Kr. 28,00.

RAKONTOJ DE OOGAI

de Mori Oogai

Kvar diverskarakteraj verkoj de elstara

japana novelisto.

Bindita: Kr. 25,00.

Aldonu 10 % al la prezoj por

sendkostoj.

Haveblaj ĉe

ELDONEJO ESPERANTO,

Boks 942, Oslo

La sekretariato de un silentas pri la propono

Rezolucio de la 52-a Universala Kongreso de Esperanto

La 52- Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Rotterdam, 2—9-a de Aŭgusto 1967,

AŬDINTE la raporton de la Estraro de U.E.A. pri la kontribuo de Universala Esperanto-Asocio al la Jaro de Internacia Kunlaboro kaj pri la transdono de la Propono por la solvo de la lingva problemo en la internaciaj rilatoj al la Sekretariato de UN la 6-an de Oktobro 1966,

PRENANTE en konsideron la decidon de la Komitato, per kiu ĝi unuanime aprobis la agadon de la Estraro, kiu en tiu ĉi kazo reprezentis ne nur la Asocion, sed ankaŭ ĉiujn subskribintojn,

AKCEPTIS en sia ferma kunsido per ĉiuj voĉoj jenan

REZOLUCION

1. La Kongreso konstatas kun kontento, ke la ampleksa speciala Laborplano de la Asocio okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro estis kontentige plenumita kaj ke, rezulte de tiu agado, minimume kvindek milionoj da personoj estis informitaj pri la Jaro de Internacia Kunlaboro kaj pri la ĉefaj aspektoj de la laboro de UN. Ĝi dankas al la Estraro pro la organizo de tiu ĉi mondskala agado kaj al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj pro ilia kontribuo al tiu rimarkinda sukceso.

2. La Kongreso same tiel aprobas la decidon de la Komitato kaj de la Estraro, laŭ kiu la Asocio partoprenos per speciala programo en la celebrado de la 20-jara datreveno de la subskribo de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj.

3. La Kongreso esprimas dankon al la Estraro pro la laboro farita en ligo kun la Propono kaj al la delegacio de la Asocio, kiu transdonis ĝin al la Sekretariato de UN, kaj plene aprobas la sugestojn de la Prezidanto faritajn en pluraj leteroj al la Sekretariato de UN.

4. La Kongreso konsideras la neklarigitan rifuzon de la Sekretariato, komuniki la Pro-

ponon al la Ŝtatoj-Membroj, aŭ meti ĝin en la tagordon de la Generala Asembleo, aŭ transdoni ĝin al Unesko, aŭ fari kiun ajn alian paŝon, kiel kontraŭan al la spirito de la Ĉarto kaj kiel maloportunan por la intereso kaj prestiĝo de UN. Ĝi opinias, ke la Sekretariato ne estas kompetenta decidi pri la sorto de Propono direktita ne al la Sekretariato mem, sed al UN.

5. La fakto, ke la Propono ne estas menciita en kiu ajn oficiala publikaĵo de UN povas esti interpretita nur kiel intenca prislentado de ĉi tiu amaspropono, kiun subskribis preskaŭ unu miliono da unuopuloj — inter kiuj centoj da mondfamaj personoj kaj miloj da aliaj eminentaj publikaj funkciuloj kaj kulturaj agantoj — kaj kiun, krome, apogis preskaŭ kvar mil organizaĵoj kun ĉirkaŭ 73 milionoj da membroj. La Propono tial prezentigas kiel unika laŭ sia enhavo kaj plej granda laŭ nombro de subskriboj iam ajn adresita en la kultura historio de la homaro al internacia instanco surbaze de privata iniciato.

6. La Kongreso esprimas sian firman konvinkon, ke unu el la fundamentaj Homaj Rajtoj, rekonita de ĉiuj civilizitaj nacioj, estas la rajto proponi/peticii, kio inkluzivas la rajton ricevi respondon. Ĝi tial esperas, ke en la Jaro de la Homaj Rajtoj la Sekretariato rekonsideros sian nekompreneblan starpunkton kaj entreprenos la necesajn paŝojn por doni normalan sekvon al la Propono prezentita la 6-an de Oktobro fare de Universala Esperanto-Asocio en la nomo de ĉiuj subskribintoj.

7. La Kongreso komisiis la Estraron de la Asocio komuniki tiun ĉi rezolucion al la Ĝenerala Sekretario de UN, atente plue sekvi la evoluon de tiu ĉi afero kaj, se necese, informi la subskribintojn pri la ĝisnuna traktado de la Propono fare de la Sekretariato de UN.

(Vidu ankaŭ, sur paĝo 109, informon pri la rezolucio senditan de nia Informa Fakto al ĉiuj Norvegaj gazetoj.)

Norvega Kroniko

Red.: KARSTEN LANGSHOLT

La Esperantoklubo de Bergen.

La unua kunveno ĉi tiun sezonon okazis en Hotel Terminus la 28. de sept. La prezidanto Elsa Værnor gvidis.

Ashild Birkenes intervjuis kelkajn membrojn pri vojaĝo eksterlanda dum la somero. Kjell Offerdal referis presajon eldonitan de «Universal Love and Brotherhood Assosiation», Japanujo, en kiu estas pritraktata la lingva malfacilaĵo nuntempe, kiam oni kaŭze de la radio kaj televido povas kontakti la tutan tergloblon. Estas nun necese havi naŭtaran langvon.

Li ankaŭ legis cirkuleron de I.O.E., Belgrado, pri esperantokursoj en suda Francujo someron 1968, antaŭ la mondkongreso en Madrido.

Annemor Jæger Bye preparolis tiun stuaĉion, ke multaj kleraj homoj post multaj jaroj en lernejo, kaj ekzamenoj, nenion aŭdis pri esperanto.

Ni ĉiuj estis samopiniaj, kiam ŝi diris, ke ni devas agi, por ke iom pri nia movado troviĝu en lernejoj libroj. Poste ni povos postuli instruon pri la lingvo.

Inger Hennemann — studento — sciigis, ke multaj el ŝiaj kolegoj kredas, ke nia celo estas tute forĵeti la naciajn lingvojn, kaj ke tiel ni perdis la originalan nacian literaturon. Kiel kutime estis kafopaŭzo, interparolo kaj kantado dum la kunveno. J. J.

Grupo Esperantista de Trondheim.

Post la pasko ni havis tri ordinarajn kunvenojn: la 11an de aprilo, la 9an kaj 23an de majo. Ni finis la tradukon de la fabelo pri la tri Bokoĵ Bruse. S-ro Utne faris paroladon pri la organizacio IOE (Instituto por Oficialigo de Esperanto). El la gazeto li legis kelkajn sugestojn pri enkonduko de Esperanto en la praktikan vivon, precipe la turistan. La sekretario de la Grupo donis kelkajn ekbriletojn de la landokongreso en Saŭda la 13an—15an de majo.

La 25an de aprilo s-ro Itamar Even-

Zohar faris paroladon en esperanto en Folkeakademiet pri la aktuala temo «La israela-araba konflikto». Lin interpretis la s-roj Hunnes kaj Utne. Poste sekvis du filmoj pri Israelo.

Nian kutiman ekskurson ni ĉi-jare faris la 11an de junio al ĉarma dometo en Vikhammerlokka. Ĉar la suno brilis la tutan tagon, ĉi tiu aranĝo estis bonega fino de la printempa semestro de la Grupo.

David Termén.

Korespondu!

46-jara medicina teknikisto, volus korespondi kun sama teknikisto aŭ flegistino, S-ro Hideo Takahasi Yokohama national sanatoriam No. 215 Iwaicho Hodogayaku, Yokohama JAPANUJO.

Mi deziras korespondi kun genorvegoj. Interesoj: filatelio, kolektado de bildkartoj kaj fiŝoj. Bernd Schaarschmidt, Tännichtstr. 4, 8054 Dresden, D.D.R.

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo, Postgiro 100.30

Kontoradrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

ESPERANTO FORLAGET A/S

(Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31

Kontoradrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:

Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, Sarpsborg.
Telefon: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Boks 942, Oslo.